

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Dec. '24-Apr. '25

57-a jaro

N-ro 197-198

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaŭ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Lijsterbeslaan 13 - BE-9630 Munkzwalm

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulinia-SP



**15-A DE DECEMBRO
2024**

ESTIS IAM... ĜRAŬMA VEZ...

... la 18^a de aŭgusto 2024, kiam atingis mian @-poŝtujon eksterordinara sciigo: **KRISTO SAVINTO VERDE VESTIĜOS LA 15^{AN} DE DECEMBRO**. Tiel titolis la mesaĝo sendita de nia Ligano James Rezende Piton, ornamita per liaj entuziasmaj vortoj.

La statuo de ***Cristo Redentor*** estas konata tra la tuta mondo kaj konsiderata unu el la Mirindaĵoj de la Moderna Mondo. Brazilo kaj ĉefe Rio-de-Janeiro tutfieras pro tiu monumento. La ĉirkaŭa pejzaĝo estas fabele impresa, tage kaj nokte, kaj la Kristo ŝajnas, ameme kaj protekteme, ĉirkaŭbraki la tutan urbon el sia elstara pozicio sur la pinto de Monto Korkovado: ne, - mi misvortumis - de tie Li sukcesas brakumi la tutan mondon, la tutan homaron!


Tia novaĵo forte min tuŝis, min tre emociis, en la vera senco de la vorto, samkiel ĝi certe kortuŝis la brazilan samideanaron.

Pri la grava evento jam ĉiuj scias ĉion, ĉar abunde aperis antaŭ, dum kaj post la evento, rilataj priskriboj kaj anoncoj, kiuj disradiadis ĉien.

Kristo Savinto verde lumigita en la naskiĝtago de nia Majstro, en la Esperanto-Tago: kia eksterordinaraĵo!

Kiu iniciatis kaj realigis tian sensacian ideon? **Walter Fontes**, esperantisto el Niterói, kiu de jaroj, strebe kaj streĉe, aktivadas por diskonigi nian lingvon, per la plej okulfrapaj manieroj.

Sed, ne nur la statuo verde brilis en tiu magia vespero, kiu estos por mi neforgesebla: tutverdiĝis aliaj tri gravaj monumentoj de la regiono: la Muzeo de Nuntempa Arto (*Niterói*), Palaco de la Urba Konsilantaro (*RdJ*) kaj Preĝejo de *Penha*, en la ĉirkaŭaĵo de Rio.



Fotoj el la revuoesperanto.org/rio2024; aŭtoroj AERĴ kaj Fernando Maia Jr., UEA-vicprezidanto.

Sed interese estas ankaŭ ekkoni, kia estis la strategia proceduro de Walter Fontes por atingi sian celaron. Li kontaktiĝis kun Pastro Omar Raposo, respondeculo de la Sanktejo *Kristo Savanto*, kiu proponis okazigon de solenaĵo, en la vespero de la Esperanto-Tago, konsistanta en la statua verdlumigo plus deklamado internacilingve sub la monumento, kaj de tie ekis la grandiozaĵo plenumita de Walter: la tuton aŭspiciis la Ĉefepiskopo de Rio, Lia kardinala Moŝto Orani Tempesta. Sed, kiel atestas la fotoj en la antaŭa paĝo, lia agado ne haltis tie...

Indas nun, refreŝigi en nia menso almenaŭ aliajn du liajn antaŭfaraĵojn: por instigi scivolemon kaj informi pri la ekzisto de nia lingvo, decembre 2010 omaĝe al la E-Tago, li sukcesis verdigi, per lumaj reklampaneloj, la faman ponton Rio-Niterói, unu el la art-inĝenieriaj mirindaĵoj brazilaj, longan 13,29 m-ojn kaj altan 70,07. Alia, tre atentoveka kaj samtempe tre laboriga, elpensado de Walter estis la organizado de Foiroj de la Esperanta libro, en Niterói, kun prezentado ankaŭ de periodaĵoj, foiro kutime daŭranta tutan semajnon.

En marto 2013^a kun grupo de esperantistoj el Rio li pretigis gigantan rubandon, longan 20 metrojn kaj larĝan 1,60 metrojn, kiun aviadilo flugigis super la marbordoj de Rio kaj Niterói.



Miloj da naĝantoj kaj promenantoj, lokanoj kaj turistoj, ekvidis ĝin: trafega reklamo!!!.

Kompreneble, la supraj indikoj pri tiu ĉi Super-Esperantisto, aktivulo de Niteroja Esperanto-Klubo (NITEK) kaj de Asocio Esperantista de R-de-Ĵ (AERJ), estas tute mankaj, ĉar vere multegas liaj aktivaĵoj en plej diversaj kampoj, kies konsiderindecon UEA agnoskis per la pasintjara transdono de diplomo pri elstara agado.

Kompreneble ne forgesendas kaj ankoraŭ dankindas, kiuj subvenciis la aranĝon, nome UEA, BEL, AERJ kaj privatuloj. Nepre menciindas, ke la plej granda parto de la materialaj kostoj, por tion realigi, estis nuligita danke al grandanimeco de la Ĉefepiskopo kaj entuziasma subteno de Pastro Omar Raposo, kiuj interalie laboris por oficiale informi Vatikanon pri la agado.

Fine: ĝojoplene ĉeesti kaj travivi tian eventon, estis por mi la kroniĝo de mia esperantisteco. Ĉio restos ĉiam skulptita en miaj koro kaj menso! **ED**

ENHAVO



Elda DOERFLER - <i>Vortoj de via prezidanto</i>	2
Albert BOON - <i>La Lima-letero de Ljudovik Samenhof el 1902</i>	4
James REZENDE PITON - <i>Esperanto en plia poŝtbanka dokumento</i>	18

ZAMENHOFOLOGIO

LA LIMA-LETERO DE LJUDOVİK SAMENHOF EL 1902

Albert Boon

“Jam maloftiĝis la nombro de liaj skribaĵoj, leteroj, poŝtkartoj, per kiuj li konstante gvidis la unuajn paŝojn de la frutempaj pioniroj.” (A. Ribot, 1965)



I Prezento

1. Enkonduko


Tiel André Ribot plendis kaj malŝarĝis sian koron, maltrankvilan pro la konstato, ke postlasitaj skribaĵoj de Zamenhof perdiĝis aŭ malaperis. Kaj ne nur sub la ruinoj de la du mondmilitoj!

Kie ja nuntempe troviĝas la originalaj konservitaj leteroj de Zamenhof? Kie la originalaj leteroj kiujn li ricevis el preskaŭ ĉiuj anguloj de la tiama mondo?

1.1. La Gotha-letero (1909)

Pravis kaj senĉese pravas Ribot, sed ni ne perdu la esperon trovi aŭ malkovri ŝajne perditajn skribaĵojn, ankaŭ ne tiujn senditajn de Ludoviko al tutmondaj pioniroj, kiuj ofte agis en la ombro.

Ekzemple, pro bonŝanco kaj hazardo la 30^{an} de oktobro 2009, okaze de aŭkcio en Victoria BC, en la kanada provinco Brita Kolombio, estis vendita al esperantisto la t.n. “Gotha letero” (1909) de Zamenhof sendita al la germana doktoro - profesoro Carl Rohrbach. En la 41^a jarkolekto de junio 2013, n-ro 245, *Literatura Foiro* aperigis monografion pri tiu ĝis tiam nekonata letero kun originala koverto, sub la titolo “La enigma odiseado de zamenhofa letero” (p.136-146). Tiu “nova” korespondaĵo, neniam antaŭe registrita aŭ presita, fine, post unu jarcento, revenis el Kanado al Eŭropo, post pago de US \$ 370.



1.2. La “Lima- letero” (1902)

Nur dek jarojn poste, la 11^{an} de novembro 2019, okaze de aŭkcio en Limo (Peruo) alia nekonata, neregistrita letero de Zamenhof sur oficiala, rusa poŝtkarto, bonŝance reiris el Sudameriko al Eŭropo post pago de € 105 kaj tiel ĝi iĝis la temo de ĉi-monografio, siavice publikigita en *Literatura Foiro*.

Kiel la Gotha-letero, ankaŭ la Lima-letero neniam estis menciata, nek en la “*Originala Verkaro*” de Dietterle (1929), nek en la “*Aŭtografoj de D-ro L.L. Zamenhof*” de Ribot (1965), nek en la kolekto “*Zamenhof; leteroj*” de Holzhaus (1975), eĉ ne en la plej kompleta kolekto en tri volumoj de la “*Originalaro*” (PVZ), redaktita de Ludovikito (Kioto, 1989-1991). Krome ne en la volumo “*Aŭtografoj de Ludoviko*” (1989), ankaŭ ne en la volumoj “*Spikumaĵoj*” I, II, III, respektive el 1994, 1995 kaj 2004.

2. Priskribo

2.1. La aktuala stato

Malgraŭ la sufiĉe alta aĝo (1902-2020), la oficiala, cara poŝtkarto estas en tre bona stato. Apenaŭ videblaj estas premmarketoj ĉe la anguloj, verŝajne kaŭze de fiksiloj, kiel pasintec uzitaj en oldaj fotoalbumoj.

Laŭ la kolekto de zamenhofaj korespondaĵoj el la jaro 1902, kompilita de Ludovikito, Zamenhof forsendis en tiu jaro:

- 31 poŝtkartojn
- 17 leterojn
- 3 korespondaĵoj sen mencio de la speco
51 entute

Do, kun la Limo-korespondaĵo, ekde nun:


- 32 poŝtkartojn
- 17 leterojn
- 3 korespondaĵoj sen mencio de la speco
52 entute

2.2. Mezuroj kaj koloroj

- mezuroj: 141mm x 89mm
 pezo: 2,31g
 koloroj: - malhelbruna, maldika kartono muara, kun ruĝaj ilustraĵoj kaj surskriboj. Manskribo per nigra inko.
 - ruĝkolora manskribita numero 228.

3. Aspekto¹


3.1. Averso



Supre, maldekstre: ruĝkolora bildo de la cara blazono de la gento Romanova (caro Aleksandro 2^a).

Supre, dekstre: ruĝa poŝtmarko de kvar kopekoj kun cirile la vortoj: “poŝta marko”.

3.1.1. Supre, meze: ruĝkoloraj surskriboj en la rusa kaj en la franca².



= “UNIVERSALA POŝTA UNIO RUSIO”

¹ Vidu 4.1.

² Vidu 4.2.

ОТКРЫТОЕ ПИСЬМО. — CARTE POSTALE.

= “POŜTA KARTO”

3.1.1. Meze, sube: per nigra inko manskribita adreso de la adresito:

Al S^{ro}

Dr. Federico Villareal³

en Lima

Peru, America

3.1.3. Maldekstre, sube: ... (?) *Amerika* (manskribita cirile)


3.1.4. Tute sube en la rusa kaj en la franca

На этой стороне пишется только адрес.

Côté réservé exclusivement à l'adresse.

= “Spaco rezervita por l’adreso”

3.2. *Reverso*




³ Vidu 4.3.

3.2.1. *Supre, maldekstre: stampita adreso de Zamenhof*⁴

Dr. L. Samenhof
Warszawa, ul. Dzika N^o 9

*Supre, dekstre: la dato.*⁵



10 / XII 02

3.2.2. *Maldekstre, meze kaj vertikale:*

Ruĝa manskribita, laŭorda numero 228. Villarreal kutimis tiel kronologie ordigi siajn esperantajn korespondaĵojn.

4. **Klarigoj** (rilate al la paragrafo 3^a)4.1. *Aspekto kaj tipo de la poŝtkarto*

La tipo de la Limo-poŝtkarto ne estis la sola tipo en Rusio. Jen du aliaj:

4.2. *La franca*

En la cara Rusio la franca lingvo estis la ŝika “lingua franca” de

⁴ Vidu 4.4.

⁵ Vidu 4.5.

kortego, nobelaro kaj riĉularo, kiel la angla de la sciencularo kaj komercistaro ekde la fino de Mondmilito 2.

4.3. “Federico Villarreal”

Jen do la nura korekta ortografio. Sufiĉe oftaj eraroj: *Federico, Villareal, Villarréal*. Ankaŭ Zamenhof skribis en la adreso “Villareal”, ĉar sur la koverto de la sendita verko la presisto mal-korekte tiel literumis la familinomon.

4.4. Dr. L. Samenhof


Jam post la apero de la Unua Libro (1887), Zamenhof komencis uzi apud sia persona nomo, aŭ anstataŭ ĝi, la alprenitajn formojn Ljudovik aŭ Ludvigo ks. Sekve li venis al la formo L.L. Zamenhof, kies unuaj literoj estis esperantigita formo de Lazaro Ludoviko. Tiun formon li konsekvence uzis en Esperanto ekde 1904.

Lia familinomo estis germandevena, kunmetita per la vortoj “Samen” (= semo) kaj “Hof” (= korto). La origina formo do estis Samenhof, sed Lazaro (< jide Lejzer) komencis ĝin per litero Z, ĉar la komenca S en la germana estas prononcata [z]. Poste, en portugalaj, svedaj kaj ĉefe en germanaj publikaĵoj li uzis ankaŭ Samenhof, por ke la germanoj k.a. prononcu ĝin Zamenhof (la prononco de Zamenhof estus “tsamenhof” en la germana!). Tamen, tiu formo iom post iom malaperis kaj en la germana jam delonge oni skribas nur Zamenhof, prononcante ĝin kiel en Esperanto.

4.5. La dato

Antaŭ la 1^a de marto 1900 la diferenco inter la Juliana Kalendaro (kutima en la rusa imperio) kaj la Gregoria Kalendaro (uzata en la cetera mondo) estis precize 12 tagoj. Post la 1^a de marto 1900 la diferenco iĝis 13 tagoj. Do Zamenhof verkis (aŭ forsendis) la poŝtkarton al Villarreal la 10^{an} de decembro laŭ la Juliana, la 23^{an} de decembro laŭ la Gregoria Kalendaro.

Rimarkinde estas, ke Zamenhof antaŭ 1900 fojfoje eĉ menciis la du datojn samtempe!



13/25 XI (18)95

5. La teksto

5.1. Transskribo

Kara Sinjoro!

*Vian libron "Esperanto
Lengua Internacional" mi
ricevis kaj mi kore vin dankas.
Mi deziras al la libro la
plej bonan sukceson kaj
mi esperas ke ĝi baldaŭ
trabatos por nia afero
largan vojon en la Suda
Ameriko.*

Kun kora saluto

Via

Samenhof

5.2. Enhavo

Kiel la "Gotha-letero", ĉi mesaĝo unuavice estas dankletero. Zamenhof sendis ĝin por danki Federicon pro la ricevo de la libro "Esperanto Lengua Internacional por el Dr. L. Zamenhof. 1902"

En venonta paragrafo, ni emfazos la pli gravan rolon de alia elemento en la teksto por la historio de Esperanto en Sudameriko kaj por la Esperanto-kulturo pli ĝenerale.

6. La adresito

6.1. **Sabio** Federico Villarreal (1850-1923)

La hispana vorto "un/el sabio" estas honora titolo, sed ĉi tie ne atribuita al Federico pro liaj meritoj kiel esperantisto, sed pro liaj sukcesplenaj agado kaj kariero kiel scienculo kaj profesoro ĉe la "Fakultato Scienca" en Limo, la ĉefurbo de Peruo. Sabio do signifas: "Saĝulo". Li estas ankoraŭ hodiaŭ multe respektata kiel unu el la plej eminentaj homoj en la historio de Peruo kaj de Sudameriko.

6.2. *Federico Villarreal, astronomo, inĝeniero, profesoro ...*

Federico naskiĝis la 30^{an} de aŭgusto 1850 en Túcume (Lambayeque) kaj forpasis en Barranco, la 3^{an} de junio 1923. Liaj gepatroj nomiĝis Ruperto Villarreal kaj Manuela Villarreal.

La loka lernejo bonvenigis lin por akiri la bazan konon. Poste liaj gepatroj sin ege oferis por povi sendi lin al Lambayeque por daŭrigi la edukadon en la mezlernejo, tiam konsiderata kiel promociilo al la instruista profesio. Li fakte instruistiĝis kaj returnis al la hejma vilaĝo kiel bazlerneja instruisto.



Federico en 1888, 38-jaraĝa

Dume kreskis lia intereso por matematiko kaj jam en 1857 li estis dungita kiel instruisto pri matematiko en la Nacia Gimnazio de Lambayeque. Federico, 26-jaraĝa, partoprenis en konkurso organizita de la samurba Konsilio. Li gajnis altmerite novan postenon, kiu permesis al li en 1877 vojaĝi al la ĉefurbo. En la sama jaro li ricevis la permeson ekstudi en la Universidad Nacional Mayor de San Marcos. Sekve li ekambiciis titolon pri matematiko en la Scienca Fakultato de Limo. En 1881 li finis la studadon en la sama fakultato kaj doktoriĝis kun plej alta distingo. Li estis la unua doktoro pri matematiko en la historio de tiu universitato.

Kiel asistanto kaj poste kiel profesoro, li iĝis eminentulo pri astronomio. Ekde 1884

li ankaŭ instruis mekanikon, grafikan mekanikon, topografion kaj kosmografion.


Kiel scienca publicisto li publikigis preskaŭ 600 artikolojn kaj librojn koncerne diversajn fakojn, kiel matematikon, astronomion, geodetikon, instruadon de matematiko, inĝenieran sciencon, historion, peruan kulturon k.a.

Li do estis sendube unu el la plej gravaj “sabio”-j de Peruo, de Sudameriko kaj eĉ de la tuta mondo.

La famo de Sabio Federico Villarreal estas tiel granda, ke en 1963 en Limo estis fondita la “UNIVERSIDAD NACIONAL FEDERICO VILLARREAL”.

Kroma respektaspekto estis lia postmorta promocio per la titolo “Ŝtatministro”.

Pro peto de la aŭtoritatoj de Túcume, la senvivaj restaĵoj de unu el la plej superbaj homoj iam vivintaj en Peruo estis elterigitaj kaj omaĝe reenterigitaj la 29^{an} de aŭgusto 1998 en lia devena hejma vilaĝo.



6.3. *F. Villarreal, la pursanga Esperanto - pioniro*

Al la sesa kajero (volumo) de sia “Ĵam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof”, Ludovikito donis kiel titolon la sloganon **“Kun gradaj paŝoj eksterlanden!”** Ĝi pritraktas la korespond-aĵojn de Zamenhof en la periodo 1901-1904.

Altirita al Esperanto per artikoloj de Charles Méray (1835-1911, Francio), Villarreal esperantistiĝis en la jaro 1900 kaj preskaŭ tuj (1901) iĝis ege aktiva adepto de la lingvo internacia. Senĉese li penis dissemi Esperanton en la sud-amerika kontinento. Li laboris por Esperanto publikigante multajn artikolojn en “Revista de Ciencias”, kiun li redaktis kaj en “El Comercio”, la plej malnova perua gazeto. En 1903 li fondis “Societon por propagando de


Esperanto". Poste estis aranĝitaj kursoj en la urboj Chiclayo, Arequipa kaj Humachuco. En Huaraz oni aranĝis E-kursojn en 1906 en la societo "Evolución juvenil".


Daŭrigintoj kaj helpantoj de Villarreal estis en 1905 pastro D. Cerna en Jesus kaj Em. Fetzet, direktoro de la nacia kolegio en Arequipa. En 1906, laŭ la interveno de la deputitoj Núñez del Areo kaj Malaga Santolatta, la parlamento donis subvencion al la E-Societo. Samjare oni komencis instrui Esperanton en la Komerca Lernejo de Limo.

La partopreno de Villarreal en la movado por Esperanto ne nur estis grava por la historio de Esperanto en Peruo, sed ankaŭ por la tutmonda movado. Li estis amiko de Zamenhof kaj membro de la komitato por la plibonigo de la lingvo. Villarreal partoprenis la unuan Universalan Kongreson en Boulogne-sur-Mer, Francio, en 1905. Bedaŭrinde, post la morto de tiu pioniro la movado en Peruo apenaŭ ekzistis. Pro la iniciatemo de Janet Skotte kaj Ulpiano Villanueva la movado reaperis en 1955. Poste, pro la interreta tempo aperis jen kaj jen gejunuloj, kiuj lernis la lingvon memstare. La provizora kulmino tamen estis la apero de gazetartikolo en la fama revuo "El Comercio". Post tiu artikolo relative multaj peruanoj komencis studi la lingvon.

En 1901, en Limo estis eldonita hispanlingva verko de Federico, traduko de la Unua Libro, sub la titolo: *"Manual para aprender la lengua internacional Esperanto, inventada por el médico ruso, Dr. L. Zamenhof"*; contiene la pronunciación, gramática y doble vocabulario para el uso de los españoles." Traducido por Federico Villareal. Lima, Imp. de la Escuela de Ingenieros, J. Mesinas, AÑO 1901, Primera EDICIÓN.

Unu jaron poste sekvis la verko *"Esperanto. Lengua internacional por el Dr. L. Zamenhof. 1902"*. Ĉi verkon li sendis al Zamenhof en Varsovio kaj decembre de la sama jaro Zamenhof respondis per la poŝtkarto kiu estas **la temo de ĉi mono-**





grafio.

Tre grava jaro por la dissemado en Sudameriko estis la jaro 1903. Se oni flanke lasas la folieton EIE, aperinta ununumere en Valparaiso (Ĉilio) en majo 1901, la revuo “*Antaŭen Esperantistoj!*” estis la unua Esperanto-gazeto en Sudameriko, kiu dum 13 jaroj (1903-1916) aperis dank’al Federico, kiu organizis kaj finance subtenis la organon ĝis la dato de sia forpaso.

Tiu revuo aperis kaj en Esperanto kaj en la hispana. Tial ĝi estis heroldata kiel “*Monata gazeto, organo de la Perua Esperantista Societo / Periódica mensual, órgano de la Sociedad Esperantista Peruana*”.

Ĝi enhavis propagandon, en- kaj eksterlandan kronikojn, bibliografion, literaturon, lingvajn demandojn, k.a. Villarreal en ĝi ankaŭ publikigis siajn sciencajn artikolojn kaj mem finance subtenis la perpoŝtan dissendadon eksterlanden. Bonŝance, aliaj “sabio”-matematikistoj kaj -astronomoj eksterlandaj, kiel li, estis esperantistoj! Kiel montras la subtitolo de la revuo, en la sama jaro Villarreal ankaŭ fondis la unuan sudamerikan E-asocion “Sociedad Esperantista Peruana”.

II K o m e n t a d o

Kiel la Gotha-letero (1909), ankaŭ la Lima-letero (1902) ne apartenas al la t.n. “famaj” leteroj, kiel tiuj al Borovko kaj al Michaux, en kiuj oni trovas ĉiujn necesajn informojn por kompreni kiel naskiĝis la internacia lingvo

kaj kiel ĝi sanĝis la vivon de la iniciatinto de Esperanto.

Tamen, ĝi ne estas banala letereto, kiel tiu en kiu Ludoviko, tamen konata kiel sufiĉe timida afablulo, devis insiste postuli de iu pastro A.F. Runstedt en Upsalo (Svedio) ŝulditan sumon, ĉar tiu pastro “forĝesis” pagi al Zamenhof “24.15 kop por la 21^{1/2} folioj de la Biblioteko”.

Kiel Zamenhof en la posta Gotha-letero instigos D-ron Carl Rohrbach re-fondi la germanan esperantan movadon, tiel li kuraĝigis en 1902 D-ron Federico Villarreal : “... ke ĝi (la al li sendita verko) baldaŭ trabatos por nia afero larĝan vojon en la Suda Ameriko”. Ambaŭ leteroj do estas po unu el tiuj sufiĉe oftaj komunikiloj **“per kiuj li konstante gvidis la unuajn paŝojn de la frutempaj pioniroj”** (André Ribot).

Kiugrade Villarreal sukcesis dissemi la Esperanto-movadon en Sudameriko provizore ne estas tute klare, pro manko de fontoj.

Tamen bonŝance mi malkovris ege interesan artikolon en numero 2 de la anglalingva “BULLETIN of the international bureau of the AMERICAN REPUBLICS”, VOL XXX de februaro 1910, pp. 268 – 269.

Jen kelkaj fragmentoj, elangligitaj el artikolo titolata “Esperanto in Pan-America” (Esperanto en Tutameriko):

Pro la aktuala strebado por disvastigi Esperanton kaj uzi ĝin por plibonigi la komercajn rilatojn inter diversaj landoj, ĉefe tiuj de Norda kaj Suda Ameriko, la BULLETIN publikigas la jenan koncizan mesaĝon far S-ro JAMES W. CHENEY, BIBLIOTIKISTO de la Milita Departamento. Laŭ li la usona konsulo en Chemnitz, Saksujo, diris:

“La graveco de Esperanto kiel faktoro de plisimpligo kaj plifaciligo de la internacia komerco estas klara kaj la nombro de oficistoj sukcesantaj senpene uzi ĝin, rapide kreskadas (...).

La Tutamerika Scienca Kongreso en Santiago de Ĉilio en januaro 1909 deklaris sian aprobon de Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo kun speciala valoro por Ameriko, la estonta kampo de agado de la du grandaj civilizacioj (hispana- kaj anglalingvaj), kiuj reciproke, kaj komerce kaj politike, kunagados.

Laŭ la perua Esperanto-revuo “Antaŭen Esperantistoj!”, propagando por Esperanto estas disvastigata en ĉiuj Sudamerikaj Ŝtatoj. La brazila registaro oficiale agnoskis la novan internacian lingvon per la decido publikigi la raporton de la Nacia Ekspozicio de 1908 en tri lingvoj: la portugala, la franca kaj Esperanto.

La revuo “British Esperantist” de aŭgusto 1909, referencante al la trilingva raporto, diras: ‘La nura enkonduko, lerte verkita en Esperanto, estas ege interesa 50-paĝa pamfleto, kiu enhavas multajn valorajn informojn, koncerne la komercajn helprimedojn kaj la socian evoluon en la



Respubliko.

Estas menciinde, ke S-ro MARQUES DE OLIVEIRA, kiu speciale tiuokaze sin dediĉis al Esperanto, verkis la raporton post lernado de la lingvo dum nur kelkaj monatoj. Rilate al la aktuala potenco kaj rapida evoluo de tiu lingvo, la progreso al kiu estos aldonata antaŭenpuŝa energio okaze de la “Sesa Ĉiujara Kongreso de Esperantistoj”, kiu okazos en aŭgusto en Vaŝingtono, la praktikaj avantaĝoj de Esperanto por komercaj rilatoj estos baldaŭ fundamente aprobataj de la plej progresemaj entreprenoj de la okcidenta mondo.”

III Postparolo

1. Sekvaj paŝoj

Tiu ĉi monografio probable iom kontribuetas al la celo de la laŭdinda Ludovikito por kompili plejeble kompletan verkaron de Zamenhof.

Ĝia apero instigu aliajn gesamideanojn ĉiam atente observi la proponojn en la kampo de (ciferataj) aŭkcioj kaj, se eble, konservi leterojn per propra aĉeto.

Krome, mi persone dezirus, ke esperantistoj kiuj posedas originalan leteron de Zamenhof, analizu ĝin kaj sciigu la rezultojn per eldono en sufiĉe fama revuo, por ke la trezoroj de nia kulturo ne dormadu en tirkesto aŭ monŝranko. *Ĉeestante dum aŭkcio okaze de la jubilea UK en Lilo (Francio), mi konstatis, ke komuna dankletero de Ludoviko kaj Klara, de ambaŭ manskribita, estis vendita je pli ol 1000 eŭroj. Bedaŭrinde, ekde tiam mi ne plu aŭdis ion pri ĝi!*

La priskribita Lima-letero ankaŭ ebligis denove prilumi aspekton de nia historio apenaŭ konata en la okcidento kaj ankaŭ eble en granda parto de Sudameriko mem.

Tial mi certe atentigos niajn peruajn samideanojn pri ĝia ekzisto kaj pri la monografio, por ke ili mem, kiuj nur devas kapti la lokajn fontojn, kompletigu tiun ege gravan kaj interesan aspekton de la esperanta kulturo.

2. Dankvortoj

Ĉi tiun verkon mi danke kaj tutkore dediĉas al mia edzino, Vivienne Tudts, ekde 1992 ankaŭ mia samideanino, kiu denove helpis min per esplorado, tajpado kaj paĝarango.

Mi evidente dankas ĉiujn kiuj iel kontribuis al la verkado kaj al la publikado.

Mi dankas Mag. Bernard Tuidar, la teamestron de la Kolekto pri Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo en Vieno, pro la sendado de gravaj informoj.

Krome, S-ron Peter Reynaers, kiu prizorgis la tradukon de hispanlingvaj artikoloj.

Laste, sed ne balaste, mian samideanon kaj amikon Marc Vanden Bempt, kiu, kiel kutime, akurate provlegis kaj sendis informojn.

Mi evidente ne forgesu tutkore danki S-rinon Perla Martinelli, kiu kune kun la redaktaro decidis publikigi ankaŭ ĉi tiun monografion en “Literaturo Foiro”.

IV Bibliografio

Enciklopedio de Esperanto, Volumo II, K-Z p. 562, Literatura Mondo, Budapeŝto, 1933

André Ribot: *Aŭtografoj de D-ro L.L. Zamenhof, Kolekto* “Zamenhof en sia tempo”, 1965

Johann Dietterle: *Originala Verkaro de L.L. Zamenhof*, F. Hirt, Leipzig, 1927

Adolf Holzhaus: *Zamenhof; leteroj*, Helsinko, Fondumo Esperanto, 1975

Ludovikito (Itô Kanzi): *Kun gradaj paŝoj eksterlanden!* Originalaro 6, Eldonejo Ludovikito, Kioto, 1979

Ludovikito: *Aŭtografoj de Ludoviko*; Kromkajero IV, Eldonejo Ludovikito, Kioto, 1989

Ludovikito: *Spikumajoj I, II, III*, Ludovikologia Dokumentaro XVI, XVII, XVIII, Eldonejo Ludovikito, Kioto, 1994, 1995, 2004

Jenny Castro Peña: *VILLARREAL, Federico*, Lexus Editores, ed. Grandes Forjadores del Peru (1^a edición), Lima: Lexus, pp. 430-431

Alberto Tauro del Pino: *VILLARREAL Federico*, Enciklopedia Ilustrada del Peru 17 (2001, 3^a edición). Lima. PEISA, pp. 2756-2756

David Carbajal: *Polinomio de Villarreal*, ResearchGate. Consultado el 20.11.18, 2016

Anthony Watanabe: *Federico Villarreal, Matemático e Ingeniero*, Lima, 2008

BULLETIN of the international bureau of the AMERICAN REPUBLICS, VOL XXX, number 2, pp. 268-269, feb. 1910

ESPERANTO EN PLIA POŝTBANKA DOKUMENTO

James REZENDE PITON

De nia karmemora klubamiko Jean Amoureux mi iam gajnis ekzempleron de poŝtbanka koverto (bildo 1) kun reklamo pri konkurso, kies premio estis partopreno en la Universala Kongreso en Stokholmo, 1934. Tiu reklamspaco estis vendata de la franca Poŝto tra la pariza entrepreno Sertic.

Tra 30 jaroj mi neniam vidis alian ekzempleron akireblan en la pluraj retaj aŭkcioj, kiujn mi regule vizitas. Supozeble tiu reklamilo tamen nepre aperis en kelkcent, eble super mil ekzempleroj, sed montriĝas tre verŝajne, ke malmultaj postvivas en kolektantaj manoj.




Bildo 1 - Sur la dorsflanko de koverto por la Poŝta Banko de Francio, reklamo, en la franca, de franclingva konkurso de “La Domo de Esperanto” en Parizo, 1934. Inter aliaj, la ĉefa premio estis senpaga vojaĝo al la 26-a UK en Svedio, kun unusemajna restado.

Ne nur Francio, sed Svislando kaj ĉefe Belgio ekspluatis tiun reklaman sistemon sur kovertoj por la alsendo de poŝtaj ĉekoj kaj konteltiroj. Ilia uzo estis senafranka. Sur **bildoj 2 kaj 3** oni povas vidi aliajn ekzemplojn de ambaŭflanka reklamado.



Bildo 2 - koverto por belgaj poŝtaj ĉekoj. En la antaŭo, reklamo de navigado inter Ostendo kaj Dover (Anglio);


Sur la dorso reklamo pri lano de la marko "Cat's" (De la Kato)



Bildo 3 - koverto por belgaj poŝtaj ĉekoj. En la antaŭo, reklamo pri motoroleo kaj benzino *Shell*.

Sekvapaĝe - sur la dorso reklamo de la belga fabriko (fond.1885) de tomato-koncentraĵo *Elvea*.

Sur tiu ekzemplero oni vidas, ke la vendo de spaco por tiaj reklamoj en Belgio same povis okazi tra privataj agentejoj.



Tiaj kovertoj el la 1930-aj jaroj abundas, kun interesaj reklamoj, kutime je alireblaj prezoj por kolektantoj (kvankam foje kun troigoj - tiu de la kato, ekzemple, estas nun ofertata kontraŭ 150 eŭroj!). La enhavo de la kovertoj, kiujn oni akiras de filatelejoj, plej ofte jam malaperis. Sed foje oni povas havi la bonŝancon trovi konteltiron, kiel oni povas vidi sur la **Bildo 4**.

EXTRAIT DE COMPTE		Bureau Central de Chèques Postaux de LYON				
18 12 35 CB*		Compte courant N° 21137				
Journal du		Avoir précédent du 10 08 1935				
DÉSIGNATION des Titres	AVOIR précédent	OPÉRATIONS DE DÉBIT				NOUVEL AVOIR
1	2	OPÉRATIONS de Crédit	Virements Internes	Autres Débits	Taxes	7
		3	4	5	6	
20897 20						
70 VASSIEUX EN VERCORS		44 00				
8/4 ST LAURENT EN ROYANS		118 60				
71 VASSIEUX EN VERCORS		77 50				
						21137 30

Nota. -- La signification des abréviations figurant dans la colonne 1 est donnée à la dernière page de l'instruction n° 109 à l'usage des titulaires de c/c. Les personnes qui ne possèdent plus cette instruction peuvent en demander un exemplaire au bureau de chèques qui délient leur compte. Il leur sera livré sans frais.

Bildo 4 - konteltiro de la oficejo de poŝtaj ĉekoj de Liono, Francio, produktita la 18-an de decembro 1935.

Ĉar oni ne ofte vidas tiujn dokumentojn, povas impresi la fakto, ke eĉ sur la dorso de konteltiro oni povis havi reklamon. La plurmetia entrepreno de perkorespondaj kursoj *École Universelle* (“universala lernejo”) produktis materialon por hejmlernado ne nur de plej diversaj teknikaj metioj kaj oficoj sed ankaŭ de ortografio, redaktado kaj eĉ bazaj lernobjektoj. Ĝiaj reklamoj troviĝas sur la kovriloj kaj paĝoj de poŝtmark-kajeroj de la 1930-aj kaj ĝi akiris la spacon de tiu formularo por anonci siajn kursojn (**Bildo 5**).

ÉTUDES CHEZ SOI

L'ÉCOLE UNIVERSELLE, placée sous le haut patronage de Ministres ministères et sous-secrétaires d'État, la plus importante école du monde, permet, grâce à ses cours par correspondance, de faire chez soi, dans le minimum de temps et avec le minimum de frais, des études spéciales dans toutes les branches du savoir. Elle vous adressera gratuitement et sur demande toutes ses brochures qui se rapportent aux études qui vous intéressent :

Brochure 71.102 : Classes primaires complètes; Certificat d'Études, Brevets, C.A.P., Professorats, Inspection primaire.
 Brochure 71.108 : Classes secondaires complètes; Baccalauréats, Licences (Lettres, Sciences, Droit).
 Brochure 71.112 : Grandes Écoles spéciales: Agriculture, Industrie, Travaux publics, Mines, Commerce, Armée et Marine, Enseignement, Beaux-Arts, Colonies.
 Brochure 71.122 : Toutes les Carrières administratives (France et Colonies).
 Brochure 71.126 : Emplois réservés aux Sous-Officiers de carrière, aux Mutiles et Réformés de guerre.
 Brochure 71.130 : Carrières d'Ingénieur, Sous-Ingénieur, Conducteur, Dessinateur, Contremaître dans les diverses spécialités : Électricité, Radiotélégraphie, Mécanique, Automobile, Aviation, Métallurgie, Forge, Mines, Travaux publics, Architecture, Topographie, Froid, Chimie.
 Brochure 71.137 : Carrières de l'Agriculture métropolitaine et de l'Agriculture coloniale.
 Brochure 71.144 : Carrières du Commerce (Administrateur, Secrétaire, Correspondancier, Sténodactyle, Contentieux, Représentant, Publicité, Ingénieur commercial, Expert-comptable, Comptable, Teneur de livres). Carrières de la Banque, de la Bourse, des Assurances et de l'Industrie hôtelière.
 Brochure 71.149 : Langues étrangères (anglais, espagnol, italien, allemand, arabe, portugais, espéranto). — Tourisme.
 Brochure 71.158 : Orthographe, Rédaction, Rédaction de lettres, Versification, Calcul, Dessin, Écriture, Calligraphie.
 Brochure 71.164 : Carrières de la Marine marchande.
 Brochure 71.167 : Solfège, Chant, Piano, Violon, Clarinette, Saxophone, Mandoline, Banjo, Flûte, Accordéon, Harmonie, Contre-point, Fugue, Composition, Orchestration, Professorats.
 Brochure 71.172 : Arts du Dessin (Cours universel de dessin, Illustration, Caricature, Composition décorative, Figurines de mode, Aquarelle, Peinture, Décoration publicitaire, Gravure, Travaux d'agencement, Figurines d'Art et Professorats).
 Brochure 71.181 : Métiers de la Couture, de la Coupe, de la Mode et de la Chémiserie (Petite main, Première main, Couturière, Vendeuse, Vendeuse-Retoucheuse, Modiste, Représentante, Modiste, Coupeuse, Coupe pour hommes, Coupeur-chémisier, Lingère, Professorats libres et officiels).
 Brochure 71.184 : Journalisme (Rédaction, Fabrication, Administration); Secrétariats. — Éloquence usuelle.
 Brochure 71.193 : Cinéma (Scénario, Décors, Costumes, Technique de prise de sons et de prise de vues).
 Brochure 71.196 : Carrières coloniales.

Écrivez aujourd'hui même à l'ÉCOLE UNIVERSELLE. Envoyez votre nom, votre adresse et les numéros des brochures que vous désirez recevoir gratuitement. Si vous souhaitez, en outre, des conseils spéciaux à votre cas, ils vous seront fournis très complets, à titre absolument gracieux et sans aucun engagement de votre part.

ÉCOLE UNIVERSELLE, 59, boulevard Exelmans, 59 - PARIS (16^e)


Bildo 5 - reklamo de *École Universelle* sur la dorso de la dokumento de Bildo 4, kun la titolo “Hejmlernoj” kiu proponas la senpagan ricevon de 17 malsamaj broŝuroj, kiuj grupe priskribas la fakajn kursojn (inter ili “Kolonijaj Karieroj”!)

Sur la broŝuro 71.149, tiu pri kursoj de “Fremdaj Lingvoj” kaj “Turismo”, oni vidas kelkajn disponeblajn kursojn (**Bildo 6**): por la angla, la hispana, la itala, la germana, la araba, la portugala kaj **esperanto**!

Brochure 71.149 : Langues étrangères (anglais, espagnol, italien, allemand, arabe, portugais, espéranto). — Tourisme.

Bildo 6 - detalo de Bildo 5, kun la lingvoj ofertataj

École Universelle, kiel dirite, plurfoje reklamis sur poŝtaj objektoj. Du el pluraj konataj ekzemploj estas sur kovriloj de poŝtmark-kajeretoj (**Bildoj 7 kaj 8**, sekvpagaĝe).



Bildo 7 - “Tio ĉi interesas al ĉiuj junuloj kaj junulinoj, ĉiuj patroj kaj patrinoj”... Reklamo de *École Universelle* sur la lasta kovrilo de franca 20-poŝtmarka kajereto el la 1930-aj jaroj. Sur la fronta kovrilo, reklamo pri kuir-oleo Calvé. Tiaj kajeretoj kun ĉiuj poŝtmarkoj, kompleta kaj en bona stato, estas maloftaj kaj alte taksataj de filatelistoj pri la plej diversaj temoj.



Bildo 8 - La sama reklamo de *École Universelle* sur la lasta kovrilo de algeria 20-poŝtmarka kajereto, kun surprasaĵoj, ke la algeriaj poŝtmarkoj estas je 40 centimoj. Ekde 1924, antaŭ la sendependeco en 1962, poŝtmarkoj por la franca kolonio Algerio jam portis la nomon de tiu lando. Sur la fronta kovrilo, reklamo pri franca poŝhorloĝo.



Jaro nekonata: Serio da glm-oj, eldonitaj de *Eugène Bollé*, direktoro de fabriko de teksaĵoj en Elbeuf, Francujo, kiu en 1904 listigis je la numero 10232 en la adresaro de personoj kiuj ellernis Esperanton. Sur ili, priskribo france kaj esperante: *Franca Urbo, famkonata pro siaj drapoj kaj lanteksajoj*. Fontoj: vikipedio k e-bay

Avant d'expédier votre courrier; renseignez-vous dans les bureaux de poste sur les conditions d'utilisation des services postaux aériens.

ÉCOLE UNIVERSELLE - ÉTUDES CHEZ SOI

Inscrivez ici vos nom, prénoms et adresse :

Indiquez par une croix celles de ces brochures qui vous intéressent.

Brochure 504 — Classes primaires complètes, brevets, C. A. P. Professorats.

— 509 — Classes secondaires complètes, baccalauréats, licences.

— 515 — Grandes écoles spéciales.

— 521 — Carrières administratives (France et Colonies).

— 528 — Carrières industrielles, travaux publics.

— 536 — Agriculture métropolitaine et agriculture coloniale.

— 545 — Carrières commerciales, banque, bourse, assurances.

— 552 — Langues étrangères. Tourisme.

— 554 — Orthographe, rédaction de lettres, calcul, dessin, écriture.

— 564 — Carrières de la marine marchande.

— 567 — Musique instrumentale, Composition. Professorats.

— 578 — Arts du dessin. Aquarelle, peinture, etc. Professorats.

— 585 — Métiers de la Coupe, de la Mode et de la Couture.

— 587 — Cinéma, mise en scène, art dramatique, photographie.

et envoyez ce bon à l'ÉCOLE UNIVERSELLE, 59, boulevard Exelmans, Paris (16^e). L'envoi des brochures demandées vous sera fait franco, à titre absolument gracieux et sans aucun engagement de votre part.

Bildo 9 - interna flanko de kovrilo de franca poŝtmark-kajereto el la 1930-aj, kun la broŝuro pri lingvoj, sed sen detaligo.

La entrepreno plu vendas siajn kursojn fine de la 1950-aj, kun alia numeriga sistemo por siaj broŝuroj. Kaj Esperanto eble troviĝas inter ili, sed bedaŭrinde ne reklamata en la malgranda spaco de poŝtmark-kajeretoj (**Bildo 10**).

ÉTUDES CHEZ SOI

Ceci intéresse tous les jeunes gens et jeunes filles, tous les pères et mères de famille.

Indiquez par une croix la brochure qui vous intéresse. Vous la recevrez gratuitement en adressant ce bon à l'École Universelle par correspondance, la plus importante du monde, 59, b^e Exelmans, Paris, ou 11, place Jules-Ferry, Lyon, ou Chemin de Fabron, Nice.

Brochure 504 — Classes primaires complètes, brevets, C. A. P. Professorats.

— 509 — Classes secondaires complètes, baccalauréats, licences.

— 515 — Grandes écoles spéciales.

— 521 — Carrières administratives (France et Colonies).

— 528 — Carrières industrielles, travaux publics.

— 536 — Agriculture métropolitaine et agriculture coloniale.

— 545 — Carrières commerciales, banque, bourse, assurances.

— 552 — Langues étrangères. Tourisme.

— 554 — Orthographe, Rédaction de lettres, Calcul, Dessin, Écriture.

— 564 — Carrières de la marine marchande.

— 567 — Musique instrumentale, Composition. Professorats.

— 578 — Arts du dessin. Aquarelle, Peinture, etc. Professorats.

— 585 — Métiers de la Coupe, de la Mode et de la Couture.

— 587 — Cinéma, mise en scène, art dramatique, photographie.

S 13-36

CARNET DE

20 TIMBRES-POSTE DE 15 F. = 300 F.

Mesdames, Mesdemoiselles, demandez...

LE BAS

CARAT

A MAILLES

IN ACCROCHABLES

MÉDAILLE D'ARGENT DU CONCOURS LÉPINE 1954

ET^s BAUDUIN-CAMBAY - INCHEY (Nord) - Tél. 6

Bildo 10 - reklamo de *École Universelle* sur la lasta kovrilo de franca poŝtmark-kajereto kun 20 poŝtmarkoj je 15 francaj frankoj. La angla, la hispana, la germana, la itala, la rusa kaj la araba estas inter la reklamataj kursoj de la broŝuro pri lingvoj kaj Turismo.



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda DOERFLER

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx-r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.

Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com

Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be

ELF-AREK tt-t-ejo: kolektado.esperanto.cc



TROVITAJ GLM-OJ EL 1912



Germanio. Tri ekzempleroj el 12-glm-a folio, kun klarigoj nur en esperanto, pri gravaj eventoj el 1912.

La plej bona germana flugo en malproksimumo 600 km en 5¼ horoj. Helmut Hirth gajnas per sia flugo de Munĥeno al Berlino la 30^{an} de Julio 1911 la premion de “Kathreiner”.

IMPERATOR la giganta vaporsipo de



Unua plilongdaŭra veturado de direktebla aershipo. Dekduhora veturado de l'eltrovinto grafo Zeppelin, la 1^{an} de Julio 1908. Mancell-Lucern-Zürich-Bodenlago.



Hamburgo-Ameriko-Linio. La plej granda sipo de l'mondo. Longa 268 metr., larĝa 29,5 metr. Ferdeko 22 metroj super la marnivelo. 1100 maristoj kaj 4000 pasaĝ. Enakvigo la 23^{an} de Majo 1912^a.